

La Esperanto-Gironde Informilo

DECEMBRO 2023



N° 173

Decembra rozo



ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Espace Simone Signoret en CENON

la 23an de aprilo 2023

de la 10a ĝis la 16a

Ĉeestas: Ĵanseb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Dominiko Martins, Olivier Moreno, Klodin' Pomiro, Marcelo Redoulez, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Jean-François Seyler, Eric Tiffon, Fernando Torres.

Elvezio bonvenigas ĉiujn, specife la multnombrajn novalvenintojn: Hervé, Olivier, Jean-François, Eric, Fernando.
Ĉiu el la ĉeestantoj sin prezentas.

1/ Translokigo de la lastaj ŝrankoj

Elvezio ege dankas Dominikon pro la grava helpo: nun la ŝrankoj staras en la konstruata domo de Dominiko en Clérac.

Marcelo: Tio estas provizora situacio: la ŝrankoj ne povos resti longtempe tie. Same la arkivo de Esperanto-Gironde kuŝas ĉe **Bernardo**; ĝis nun neniu novaĵo el la departemanta arkivejo. Oni devas rapide trovi solvon.

Yannick: La biblioteko (libroj) estis alportita al Kvinpetalo, Esperanto-Kulturcentro en Boursesse, sude de Poitiers.



2/ Anstataŭigo de la kasistino

Martine devas baldaŭ translokiĝi al Aŭvernjo, do iu devas ŝin anstataŭi.

Martine klarigas la rolon de la kasisto: déposer des chèques, régler quelques factures. Le site d'Espéranto-Gironde se paie par prélèvement automatique. L'assurance est à régler une fois par an. Tenir la liste des adhérents (actuellement : 21).



Expédition des bulletins de LEGI (actuellement 7 à envoyer par la poste). Klodin' veut bien se charger de l'expédition de LEGI. Tenir les comptes (à ce jour 6225,23 € en caisse, dont la moitié sur le compte épargne).

Restent en suspens :

- La question des droits d'auteur : Universal : réglé ; Warner : en attente. Yannick a tenté depuis plusieurs semaines, en vain, de joindre la personne qui s'en occupe.

- La transmission des fonds restants de l'association de Gujan-Mestras à une association de Madagascar.

- Le don à l'Ukraine : 163 €, pas encore remis ; il avait été prévu de les remettre à la Croix Rouge Ukraine.

Martine a aussi les adresses pour les autorisations des droits d'auteurs et différents documents (contrat Universal, ISBN...)

Bernard va voir avec l'Institut d'Histoire Sociale de la Bourse du Travail pour nos archives qui n'intéresseront pas les Archives départementales.

Dominiko : Existe-t-il un tarif d'adhésion spécial pour les personnes en difficulté ?

Klodin' : Cela a été envisagé, mais comme personne ne le demandait, aucun tarif n'a été établi jusqu'à maintenant.

Dominiko : Il existe des imprimeurs en ligne, avec des tarifs intéressants.

Martine a reçu une offre par internet.

Marcelo : L'imprimerie au Pays Basque est très compétitive car la TVA n'est que de 4% en Espagne.

Yannick : Pour les associations loi 1901 : Lors de la démission d'un membre du CA, le démissionnaire peut être remplacé par un autre membre de l'association (pas obligatoirement du CA), validé par le CA, jusqu'à la prochaine AG.

Yannick propose de se renseigner auprès de l'agence du Crédit Agricole de Montendre pour savoir comment procéder pour des opérations bancaires (remise de chèques par exemple) entre deux agences appartenant à deux secteurs différents. Il pourra prendre provisoirement la relève de Martine.

Candidature approuvée à l'unanimité des présents, et validée par le CA.

Martine propose d'aider son successeur à prendre la suite.

Martine : Il reste 94 timbres à 1,16 € de la subvention de SUD : à utiliser pour l'expédition des LEGI et des Brassens.

3/ Vivo de la retejo

Dominiko explique ce qu'est une liste de discussion : une seule adresse pour tous les destinataires qui se sont inscrits à la liste. Cette liste de discussion dépendra du site OVH Wordpress. Elle pourra servir à la diffusion d'une novaĵletero, dont la parution ne sera pas obligatoirement régulière.

Les LEGI seront mis sur le site, y compris le dernier paru.

Dominiko kaj Eriko zorgos pri la novaĵletero.

Yannick kaj Janine kunportis la belan kanzonlibron senditan de Kimie kaj ĉiuj ĝin foliumas.

La kunveno finiĝas je la 13a30.




Post la manĝo, Marcelo proponas bildaron pri citaĵoj de la filozofo matematikisto Bertrand Russel, honore al Martine, kiu estis instruistino pri la angla. Ni, ĉiu je sia vico, legas la tekstojn de la citaĵoj kaj eventuale proponas korektojn aŭ plibonigojn.

La venonta kunveno okazos la 11an de junio (la raporto pri tiu-ĉi kunveno aperis en la nro 172).

Ni disiĝas je la 16a15.

Janine

Pensoj de Bertrand Russell
brita filozofo, matematikisto, 1872-1970



Preferu celi
perfektecon kaj
ĝin maltrafi ol celi
malperfektecon kaj
ĝin atingi.

Il vaut mieux viser la perfection et la manquer
que viser l'imperfection et l'atteindre.

Pensoj de Bertrand Russell
brita filozofo, matematikisto, 1872-1970



Homoj naskiĝas
nesciantaj sed ne
stultaj. Edukado
stultigas ilin.

Les hommes naissent ignorants et non stupides.
C'est l'éducation qui les rend stupides.

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en CAMES, ĉe Klodin' kaj Marcelo
la 24an de septembro 2023
de la 10a30 ĝis la 16a

Ceestas: Ĵanseb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Katya Gradzion, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Dominiko Martins, Klodin' Pomiroł, Marcelo Redoulez, Bernardo, Marie-Rose kaj Maeva Sarlandie, Fernando Torres.

Senkulpigitaj: Martine Edelbloude, Hervé Giranton, Jean-François Seyler.

Elvezio dankas al Klodin' kaj Marcelo pro la gastigo kaj bonvenigas ĉiujn. Dankas pro la lasta numero de LEGI.

1/ Sidejo de Esperanto-Gironde kaj loko(j) por la kunvenoj

Klodin': Ni ne plu konas iun en la nova urba estraro. La nova direktoro pri kulturo akceptos nin la 26an de oktobro. Ĉiuj salonoj estas pagendaj. Ĉiuj salonoj ne estas alireblaj dimanĉe.

Paralele, problemo pri la sidejo. La responsulino de la mediateko favoras, kaj ankaŭ bonvolas akcepti nin por la kursoj, sed estas nur tri partoprenantoj. Cetere la salono estas vasta kaj vintre tre malvarma. Do unue ni renkontu la direktoron.

Andreo sugestas retajn interŝanĝojn por ne ĉion forlasi. Sed ĝenas, ke ne plu estos rektaj renkontoj kaj interŝanĝoj.

La kursoj ankoraŭ ne rekomenciĝis.

Cetere komence de oktobro la mediateko ne estos libera kaj Klodin' kaj Marcelo malĉeestos dum la dua parto de la monato.

Klodin' dubas pri solvado de la problemoj, des pli, ke nun neniu membro loĝas en Cenon.

Elvezio: Do ni devas prepari B-planon.

La sidejo povas esti ĉe la prezidanto.

Bernardo konas konsilantinon en Cenon. Marcelo povus ŝin kontakti. Ŝi estas anino de LFI, en la teamo de la urbestro: Claudine Chapron, dokumentistino en lernejo.

Klodin' suspektas, ke la urbestro ne favoras al Esperanto. La salonoj de la Maison des associations ne funkcias dimanĉe kaj eble eĉ ne sabate; ĉiel neniam ni ne rajtos okupi salonon dum tuta tago.

Elvezio: Se la sidejo estos en Pesako, ni eble povos senpage disponi pri salono. Esploros.

Klodin': Asocio devas elmontri sin kunvenanta en publika salono; en privata loko, ĝi ne vere ekzistas.

Elvezio: Ni atendu la 26an de oktobro por decidi pri la sidejo.

Janine: Ŝanĝo de sidejo devas okazi dum eksterordinara asembleo. Tute eblas okazigi en la sama tago la eksterordinaran kaj la ordinaran asembleojn.

Elvezio: La ŝanĝo de kasisto okazos dum la ordinara ĜA.

Bernardo: Se la sidejo estos en Bordoza, ni eble povos uzi salonon en Athénée Municipal.

Elvezio: Kiel fari, por ke la sidejo estu en Bordoza?

Yannick: Ni kontrolu, ĉu oni rajtas dispartigi la oficialan adreson disde la poŝta adreso.

Dominiko: La asocio Le Garage Moderne povas havigi lokon.

Klodin': Temas pri eksgaraĝo kun maŝinoj en kvartalo Bacalan, sed ne pri kunven-salonoj.

2/ Pri la arkivejo

Bernardo: Neniu novaĵo.

Dominiko: Eriko faris paĝon por la retejo de Espéranto-Gironde.

Bernardo prizorgas la Facebook-paĝon kaj poŝtas artikolojn, mesaĝojn...

3/ Pri Brassens

Yannick: Neniu novaĵo. Warner neniam plu respondas al telefonalkvokoj. Denove sendos retmesaĝon.

Klodin': Dum la SAT-Kongreso vendiĝis 6 ekzempleroj.

4/ Diversaj aferoj

Ĉiuj favoras al Yannick por transpreni la taskon de kasisto. Tio estos oficialigita okaze de la ĜA.

Yannick: Martine daŭre ricevas la konteltirojn.

Joël: Espéranto-Galgon haltis kaj estis decidite doni la restantan sumon al Esperanto-Gironde.



Elvezio: En la Universitato, estas du lernantoj, kiuj eble daŭrigos.

Joël: Novaĵo pri Créon: Argentino paro, kiu lernis kun Morine, nun daŭre zorgas pri la grupo.

Marcelo: Ĉiuj geamikoj, kiujn li havis en la urbodomo de Cenon, ne plu laboras tie pro diversaj kialoj. La nuna teamo kaj la nuna direktoro pri kulturo ne ŝajnas

favoraj al la asocioj (sociaj, kulturaj, engaĝitaj...). La asocioj rajtas nur tri datojn por kunveni, antaŭdeciditajn komence de la jaro.

Jean-Seb: Se ni ne povas disponi pri salonoj, ni povas videe kunveni.

Dominiko: Eblas videokunveni per Framasoft.

Janine ne favoras videokunvenojn, male **Katya** favoras.

Gloria: Kelkaj kafejoj disponigas kunvensalonojn, sed por limigita tempo.

Jean-Seb: Oni povus eĉ disvastigi la videokunvenojn al eksterlandanoj.

Dominiko: Ekzistas diskut-retejoj tra la mondo, listigitaj ĉe Eventa Servo.

Marcelo: Sekve de la SAT-Kongreso la grupo el Seulo petis, ke Marcelo prezentu la florojn per videokunveno.

Bernardo: La interasocia kongreso (IFEF, UFE, ktp) okazos en Strasburgo de la 8a ĝis la 12a de majo.

Marcelo: La venonta SAT-Kongreso okazos en Porto.

La eksterordinara kaj ordinara asembleoj okazos sabaton la 25an de novembro.

Janine



NIAJ KURSOJ

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono C-125, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)



Agrablajn julajn festojn !

ESPERANTO-GIRONDE
ASSEMBLEE GENERALE EXTRAORDINAIRE
au Centre Culturel de MONTENDRE
le 25 NOVEMBRE 2023 à 11h

Présents ou représentés : Luca Buselli, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Domingos Martins (pouvoir à Eric Tiffon), Olivier Moreno (pouvoir à Janine Dumoulin), Claudine Pomirol, Marcel Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Jean-François Seyler, Eric Tiffon.

Excusés: Jean-Seb Brilleaud, Katya Gradzion.

L'objet de l'assemblée générale est la modification de l'article 8 des statuts :
Article 8 des statuts de 1998 : « Le siège social de l'Association est fixé à Cenon, Centre Culturel Château Palmer. »

Devient : « Le siège social de l'association est fixé au domicile du président »

Résolution adoptée à l'unanimité.

L'assemblée générale extraordinaire est clôturée à 11h25.

ESPERANTO-GIRONDE
ASSEMBLEE GENERALE ORDINAIRE
au Centre Culturel de MONTENDRE
le 25 NOVEMBRE 2023 à 11h30

1. Rapport d'activité

Depuis la dernière assemblée générale (16 octobre 2022) :

- LEGI : sont parus 4 numéros : 169 à 172.
- Réunions : Il y a eu 5 réunions :
 - 11 décembre à la salle Simone Signoret
 - 22 janvier à la salle Simone Signoret
 - 19 février à la salle Simone Signoret
 - 23 avril à la salle Simone Signoret
 - 11 juin à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 24 septembre à Cambes
- Nous avons déploré la disparition de Monique Assailly le 30 juin.
- Activités et événements :
 - Les associations ont été chassées de Palmer en octobre 2022.



- Les cours du lundi se sont déroulés depuis cette date à la Médiathèque de Cenon (5 participants).
- La bibliothèque d'Espéranto Gironde a été transportée à Kvinpetalo (Bouresse) fin octobre 2022.
- Il y avait deux étudiants pour le cours d'espéranto à l'université.
- Le groupe de Galgon a été dissous en octobre 2022.
- Marcel, Claudine et Katya ont animé une conférence à Tours le 4 mars 2023.
- Le groupe a reçu en cadeau de la part de Kimie Markarian un très beau livre de chants du Japon en espéranto.
- Le groupe de Gujan-Mestras a été dissous début 2023.
- Marcel et Claudine ont participé au congrès de SAT à Grésillon.
- Bernard et Rose ont participé au congrès universel à Turin.
- Depuis septembre les salles à Cenon sont payantes, donc il n'y a plus de lieu pour se réunir et il faut changer l'adresse du siège dans les statuts. Marcel et Claudine ont rencontré le 26 octobre Quentin Dagobert, directeur de la Culture à la mairie de Cenon : l'association comporte peu de membres présents aux réunions et personne ne loge plus à Cenon. Il faudrait un groupe d'au moins 8 à 10 personnes pour que soit étudiée la possibilité d'obtenir une salle pour les réunions du lundi. Pas de possibilité pour les rencontres mensuelles en fin de semaine.



L'objectif de la mairie est que les associations participent à la vie associative de la commune, en particulier à destination de la jeunesse. Il a été proposé que les cours du lundi se fassent en visio, ce qui a eu lieu deux fois.

Quand l'association aura son siège social à Pessac, chez le président, il sera plus facile de demander une salle pour les réunions mensuelles.

- Le projet Brassens a avancé petit à petit : Warner a envoyé le contrat et a bien reçu le chèque. Il reste maintenant à régler les droits de traduction des deux textes de Paul Fort auprès de Flammarion. Reste la question « Heureux qui comme Ulysse ». Il faut reprendre contact avec l'éditeur en Suisse (qui a déjà donné son accord et a dit qu'il s'alignerait sur les autres ayants-droits).
- Le site internet a été mis à jour.
- A l'université, il y avait deux élèves pour les cours d'espéranto en 2022-2023 ; il y en a cinq pour 2023-2024. Les cours ont lieu le mercredi à 17h30 (salle C 125).

- A la suite du déménagement de Morine, deux bénévoles débutants s'occupent du groupe de Créon, qui se nomme désormais le Groupe Entre-deux-mers Espéranto (GEME) et a son siège chez le président à Saint-Genès. Le président a pris contact avec Marcel et Claudine et a demandé si Espéranto-Gironde est intéressé par des réunions communes régulières, pour pouvoir pratiquer. L'association compte 4 membres plus 2 enfants. L'association de Galgon a offert son matériel à GEME.

Le rapport d'activité est approuvé à l'unanimité

2. Rapport financier

Du fait du déménagement et de la démission de Martine Edelbloude, trésorière, Yannick Dumoulin a été sollicité pour se charger de la tenue des comptes jusqu'à l'AG.

La présentation des comptes n'est pas précise : grâce à l'accès au compte bancaire, on peut connaître les dépenses mais pas toutes leurs affectations.

L'habitude était jusqu'à maintenant de faire le bilan financier d'une AG à l'autre mais il faudra envisager de présenter les comptes par année civile.

Compte courant : En octobre 2022 : 3522,98 €

En novembre 2023 : 3049,18 € + espèces (104,12€) = 3153,30 €

Soit sur 13 mois un déficit de 379,68 €

Livret A : Au 31 décembre 2022 : 3097,33 €

Entre octobre 2022 et novembre 2023 :

Recettes : 1190,21 €

Dépenses : 1674,01 €

Yannick s'est renseigné pour effectuer des opérations à distance :

1/ Pas de problème pour déposer chèques et espèces à Montendre.

2/ Pour déposer de l'argent : cela ne peut se faire qu'au guichet, en étant muni d'une pièce d'identité et de la délibération (élection de trésorier).

Formalités pour le changement de trésorier : se présenter à l'agence de Bordeaux avec le président et apporter la délibération (élection du trésorier), une pièce d'identité et un certificat de domicile.

A l'agence de Bordeaux les virements sont payants : 3,89 € et doivent être effectués en agence ou par courriel). On peut aussi s'abonner pour 4 € par mois pour pouvoir faire des virements par internet.



En revanche à l'agence de Montendre les virements sont gratuits et peuvent se faire par internet.

On ne peut pas transférer le compte d'une agence à l'autre : il faut fermer le compte (gratuit) et en ouvrir un autre.

L'assemblée générale approuve le principe d'ouvrir un compte à Montendre.

Le rapport financier est approuvé à l'unanimité

3. Projets

- Proposition d'un tarif d'adhésion spécial étudiants et chômeurs à 10 €.

Cette proposition est approuvée à l'unanimité et prend effet immédiatement.

- Claudine présente la proposition du GEME pour des rencontres périodiques. Le GEME invite Espéranto-Gironde pour le Zamenhof-tago le 9 décembre à Saint-Genès.

- Prochain congrès européen d'espéranto à l'université de Strasbourg les 8, 9, 10, 11 mai. Plusieurs associations françaises (France Espéranto, IFEF etc.) et des associations européennes : l'Allemagne sera représentée, l'Italie et l'Espagne ont été sollicitées.



Bernard et Rose ont prévu d'y participer.

- Eric lit plusieurs propositions de Domingos :

- participer à des forums des associations ;
- porter sur soi un signe de reconnaissance Espéranto ;
- mettre tous les numéros de LEGI sur le site (numériser les premiers ;

Marcel s'y emploie : très lourde tâche. Les numéros 0 à 25 ont été scannés).

- rencontres au bar associatif Le petit Grain (rencontres régulières à jours fixes : un programme est édité)

- Elvezio participera à la Journée des Langues à l'université (fin mars / début avril).

4. Questions diverses

Yannick informe que Domingos a résilié l'abonnement OVH pour l'hébergement du site (environ 40 € par an) et héberge désormais gratuitement le site d'Espéranto-Gironde sur une partie de son propre site. Remerciements à Domingos.

- Elvezio : Il n'y a plus de rencontres au café des langues à Pessac, car l'espéranto n'est pas la langue d'une ville jumelée.

5. Renouvellement du tiers sortant

Le bureau démissionne dans sa totalité (Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Martine Edelbloude).

Elvezio Canonica et Janine Dumoulin se présentent à nouveau.
Yannick Dumoulin se présente.

Les trois candidats sont élus à l'unanimité.

Composition du bureau :

Elvezio Canonica

Janine Dumoulin

Yannick Dumoulin

L'assemblée générale ordinaire est clôturée à 13h25.

**ESPERANTO-GIRONDE
RÉUNION DU BUREAU
au Centre Culturel de MONTENDRE
le 25 NOVEMBRE 2023 à 13h30**

Sont élus :

Président : Elvezio Canonica



Trésorier : Yannick Dumoulin

Secrétaire : Janine Dumoulin



Post la manĝo Marcelo proponas komune kanti la kantojn *Tuj la kompanar'*
kaj *La geamantoj sur la verda benk'*.

Kaj sekvas bildaro pri la « nigra » kaj la « blanka » bretonaj insuloj (vidu
p.18)



Janine

TORINO 2023: 108-a UK



Estis nia 4a Universala Kongreso, post Havano en 2010, Hanojo en 2012, kaj Lisbono en 2018, kaj nia 3a vizito en Torino, la urbo kie Guilhem, nia filo, edziĝis. Ni estis nur du el Ĝirondio.

Ni alvenis aŭte vendredon vespere kaj estis surprizitaj renkonti niajn geamikojn JUY en la sama hotelo. Poste ni vespermanĝis kune.

Sabaton matene, ni vizitis la akceptejon por kolekti la dokumentojn kaj piede iris ĝis la reĝa palaco, kie sidas la muzeo Reali, kiun ni vizitis page. Poste ni esploris la movadan foiron sur la korto de la kongresejo. Tie oni rimarkas, kiel ege vivanta estas la movado.



Dimanĉon matene okazis en alia loko, en la salono Zamenhof kompreneble, la sole-na malfermo fronte al ĉirkaŭ 1400 kongresanoj. Mi miris pro la talento de la tradukisto de la itala al Esperanto. Elirante el la salono, la giganta komuna foto kunigis nin.

La manĝejo estis apude, ĉe studenta restoracio.

Posttagmeze, ni malkovris italajn muzikistojn, unue Grazia BARBONI, gitaristinon, kaj poste la Birdan Flut-trio: la nomo estas sufiĉe signifoplena. Kiel kutime, la unua vespero estis dediĉita al la akceptanta nacio: tre bela kaj bunta programo.

Lundon matene: kleriga lundo; ni partoprenis en kunveno pri ĝemelitaj urboj; ni ne lernis multe tie. Male, la unua leciono pri la itala lingvo entuziasmigis nin. Sekvis la ĝenerala asembleo de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperanta), kiu havas membrojn en 20 landoj. Ĉio glatis kaj ni preparis la merkredan ekskurson, kiam la kongreso fermiĝos. En alia salono, ni aŭskultis koncerton de du bardoj, unu sen barbo, Georgo HANDZLIK, kaj unu kun barbo, Mikaelo BRONŝTEJN. Ni forlasis antaŭ la fino por prepari nin por la bankedo. Ĝi okazis sur la korto de la reĝa palaco, kaj dum tiu nokto la muzeo estis malfermita senpage por la kongresanoj! Nia tablo estis tre diversa. Kimo, kiun ni ne konis, manĝis kun ni inter du akordionaj

ludoj. Duncan CHARTERS, la prezidanto de UEA salutis ĉiujn tablojn. Malfeliĉe oni devis atendi tre longe antaŭ ol esti servitaj.

Mardon ni ekskursis al Milano kun ege interesaj ĉiĉeronoj. Ĉu vi scias ke la nomo Milano eble venas de gaŭla vorto? Ni vizitis la kastelon kaj la Duomon. La vizito estis en la itala kaj tradukita al Esperanto. La tradukisto notis nenion, kaj li forgesis nenion: mirinde! ĉar la itala ĉiĉerono parolis dum longaj minutoj.



Vespere ni ĉeestis teatraĵon: Mi diros al vi sekrete: kabareda programo fare de Saša PILIPOVIČ kaj Georgo HANDZLIK: la satiro ridigis nin.

Merkredon, do, ni iris kelkajn kilometrojn for de Torino, ĝis naturista kampadejo nomita Le Betulle. Ni estis 17 el diversaj landoj, kaj Esperanto estis prezentita al la loĝantaro, kun bela sukceso. Nin trafis aŭtakcidento, kiam ni revenis Torinen.

Fino de la kongreso por ni, kaj kiel ĉiam, ni ĝuegis nian (mallongan) partoprenon.

Bernardo kaj Rose



VIZITO DE LA MUSEO REINA SOFIA EN MADRIDO

Antaŭ mia vojaĝo, mi serĉis en kiu madrida muzeo estas *Guernica*, la fama pentraĵo de Picasso. Ĝi troviĝas en la *Museo Reina Sofia*, precipe dediĉata al moderna arto.

Do mia nepino kaj mi, dum milda mateno malpli varma ol en Bordoza, nin direktis al tiu muzeo, en la centro de Madrido.

Ni senprobleme trovis *Guernica*-n: multaj paneloj indikis la salonon en kiu ĝi estas.



Kun surprizo ni konstatis la grandajn dimensiojn de la pentraĵo (3,49m x 7,77m). Ĝi sola bezonas tutan salonon.

Oni konas la historion de *Guernica*. Picasso pentris tion dum la Hispana milito post la bombado fare de naziaj aviadiloj super malgranda urbo nomita Guernica, en Vasko lando.

Multfoje mi vidis la foton de *Guernica*, sed la realismo de la vera pentraĵo emociis min. Picasso per sia granda talento sukcesas komuniki al la gespektantoj sian indignon pri la intercivitana milito per gravaj kaj grandegaj detaloj.

Poste, en alia salono, estis ekspozicio de afiŝoj pri la Hispana milito, per kiuj socialistoj, komunistoj kaj anarkiistoj petis helpon por venki faŝismon. Ili laŭdis la kuraĝon de tiuj homoj kiuj, ofte solaj, batalis kontraŭ siaj mortigantoj.

Unu el ili estis verkita en Esperanto. Oni povis legi:

KION VI FARAS POR EVITI TION? GEESPERANTISTOJ EN LA TUTA MONDO AGU ENERGIE KONTRAŬ LA INTERNACIA FAŜISMO

Tiu slogano, skribita en 1937, sonas hodiaŭ en Eŭropo laŭ maltrankviliga maniero...

Gloria



NI FUNEBRAS

Ni hodiaŭ eksciis pri la forpaso de karmemora

Mikaelo Lavergne

Li naskiĝis la 15an de januaro 1935 en Latresne (33). Instruisto, Michel eklernis Esperanton fine de la sesdekaj jaroj. Li partoprenis en la Universala Kongreso en Tokio en 1965 kun Gaïta kaj Leo Robert. Li estis kunfondinto de la unua *Groupe Girondin des travailleurs espérantistes*. Kaj post kelkaj jaroj ekster la asocio li reaktivis en la okdekaj jaroj kaj rolis kiel prezidanto de Esperanto Gironde de oktobro 1990 ĝis oktobro 1995. Li ekzemple oficiale oficis en la tiama Conseil Général de la Gironde por subskribi la ĝemeliĝon inter Esperanto-Gironde kaj la Eŭska grupo de Vitorio okaze de la SAT-Amikara kongreso en aprilo 1992.



Mikaelo Lavergne, prezidanto de Esperanto-Gironde, Gérard Lagors, Vicprezidanto de la departementa Ĝenerala Konsilio, Iñaki Gaŭna, prezidanto de la Eŭska Grupo de Vitorio, Rolando Grandière, prezidanto de SAT-Amikaro, Monique Dussenty.

Humurplena, ŝerceme prezentante personan adapton de «*la meso*», ŝatanto de vortludoj kaj aparte de kontraŭknaĵoj, *Mikaelo* ofte nomis sin *Miakelo*. Lin tre inspiris Raymond Ŝvarc', lia plej ŝatata aŭtoro. Li tre lerte prelegis pri ties plej fama verko *Kiel akvo de l' rivero*, des pli ke li devenis de la lorena regiono priskribita en la unua parto de la romano.

Krom Esperanto, alia ŝatokupo lia estis la longdistancaj kuradoj kaj vetermarŝadoj. Lia persona trezorejo plenplenis je medaloj kaj pokaloj gajnitaj en multaj konkursoj. Ekzemple, la 100km de Belvès, la 24 horoj de Belvès. Li ankaŭ rekordis en la nombroj de partoprenoj en la ĉiujaraj kuradoj organizitaj de la tagĵurnalo

Sud Ouest en Gujan-Mestras... kaj ĉiam li tiam fiere surmetis sian T-ĉemizon «*Esperanto? Jes, volonte!*»

Li arte subskribis siajn leterojn aŭ artikolojn por LEGI.

Komence de la 21a jarcento Mikaelo perdis aŭdkapablon kaj pro tiu ĝenado li ĉesis viziti siajn kunvenojn.

Post la forpaso de lia edzino Paulette en 2011, Mikaelo loĝis unue en por-maljunula hejmo en Cenon. Kaj pro seniliĝo, li finis sian vivon en Monts (37). Li forpasis 88-jara la 6an de majo 2023.

Dankon pro ciaj agadoj. Adiaŭ Mikaelo!

El la broŝuro eldonita okaze de la 50jariĝo de Esperanto-Gironde

Miakelo LAVERGNE ŝvarcumita far Marcelo

Ĉu vi iam spektis meson servitan de Mikaelo? Diable! Eterna ŝercemulo Mikaelo fidelis al Rajmondo Ŝvarc' per kontraŭknaĵoj kaj ĉiaj vortludoj ĝis lia ofta subskribo *Miakelo* kun hirundo kaj steleto. La ĉefverkon *Kiel akvo de l' rivero* li majstre prezentis al ni identigante familiajn eventojn kaj specialajn vojaĝojn en Lorenon kaj Marsejlon por plene travivi siajn relegadojn.

Miakelo? Ek al mio. Okmiela alkemio: kia melo! Alimoke el amiko. Male, kio?




*Mikaelo kun Paulette.... kaj Yoshie Kleemann
okaze de la Zamenhof-tago 1990 en Artigues*

La 28an de novembro 2023

Marcelo

La Nigra insulo

Ĉu Hergé inspiriĝis de la bretona insuleto “l’île noire” en Carantec?



Ĉiu ja konas la aventurojn de Tinĉjo sur la **Nigra insulo**. La tradukon de Jo-Petro Danvi publikigis Esperantix en la jaro 1987. Bernhard Pabst en *Monato* draste recenzis ĝin kiel «lingve nekontentiga¹».

La originalo de Hergé estis unue felio-tone publikigita en la gazeto *Le petit Vingtième* inter la 15a de aprilo 1937 kaj la 16a de junio 1938.

Sed kiu reala insulo inspiris la desegniston? Mistero!

Al tiu tre grava demando neniam rekte respondis la aŭtoro, nek lia abunda dokumenta ikonografio, nek liaj arkivoj.


Kaj des pli profundigas la fascino de la Tinĉjemuloj². Kaj ekfloris diversaj respondoj de konvinkemuloj pri pli aŭ malpli fantaziaj asertoj. Inter tiuj nomeblas la mediterranea Ile d’or fronte al la kabo Dramont ĉe St-Raphaël, la vendea Malnova Kastelo sur la insulo d’Yeu fronte al la haveno de La Meule, sed ankaŭ pluraj skotaj kiel la Black Isle kun ĝia kastelo Craig, aŭ Arran kun la kastelo Lochranza, eĉ la Kisimul-kastelo sur la roko ĉe la insulo Barra inter la insularo de la foraj Hebridoj!

Ja okaze de tiu aventuro Tinĉjo kaj Miluo vojaĝas ĝis Skotlando, do kial ne?

«Tamen, respondas la Bretonoj, ni restu seriozaj! Kompreneble la vera, la aŭtenta Nigra insulo estas l’île noire ĉe Carantec en la Morleza golfeto!

Simple ĉar Hergé vivis sur la apuda marbordo dum la dua mondmilito...»





Kompreneble, nek la legenda regionismo de la bretonoj, nek la vantemo de la tiea turisma oficejo, troigas en la reproduktaĵo de la ĉi-apuda aĵo.



Fontoj:

- <http://retbutiko.be/fr/ero/nins>
- <https://tintinomania.com/tintin-recherche-ile-noire>

Dum posttagmeza surmara promenado ni velis sur tradicia ligna velŝipo dank' al lerta, simpatia kaj interesa kapitano el Roskovo sur la golfeto de Morlezo.



«Ni hisu la velojn, ĉar blovas la vent'
Finfine ni foriru en ĝusta moment'...»


Marcelo

SULO, LA PLEJ GRANDA MARBIRDO EN EŬROPO

Se SATanoj parolas pri Sulo, ili preskaŭ ĉiam mallongige aludas pri la revuo *Sennaciulo*. Tamen ĉi tiu artikolo parolas pri la PIVa SULO, «genro de grandaj birdoj el la ordo de pelikanoformaj, kiuj loĝas kolonie sur la marbordo kaj kaptas fiŝojn plonĝante.»

Fakte en Eŭropo sulo estas la plej granda marbirdo. Plenkreske la sulino, iom pli granda ol la virsulo, mezuras inter 85 kaj 100 cm (de bek' ĝis vosto) kaj ĝia enverguro ampleksas preskaŭ du metrojn. Tio faciligas longdaŭran ŝvebadon.

La specio observata dum junia ŝipado ĉirkaŭ la Manikaj Sep insuloj norde de Perros-Guirec estas *Morus bassanus* (tradukebla kiel *Ekstravaganca el la insulo Bass - Fou de Bassan*). Plenaere, samkiel surgrunde, eleganta estas ĝia blanka figuro kun nigro ĉe la ekstremo de la flugiloj kaj flavecaj kapo kaj nuko. Ĝia pinta beko estas griza. Bluan de ĝiaj okuloj reliefigas nigra konturo kvazaŭ ŝminko.



neston. Ĝia pozicio sur la roko dependas de strikte respektita hierarkio. La plej imponaj paroj lokiĝas supre. Kaj la tutan surfacon okupas la kolonio. Po 180 nestoj sur 100 m². Unu kontraŭ la aliaj. Forta koncentriĝo. La birdoj komunikas inter si per blekadoj, kiuj sonas al niaj homaj oreloj kiel kakofonio. Tamen ili rekonas la vokon de la partnero, por loki ĝin.



Post demeto de ununura ovo en aprilo aŭ majo, dum 40 tagoj ambaŭ gepatroj ĉiu siavice kovados. Dume la alia fiŝkaptas por nutri sin kaj provizi la idon dum tri monatoj post la naskiĝo.



Observante la metodon fiŝkapti, vi komprenos, kial la maristoj el Skotlando, de kie originas la birdo, eknomis ilin «frenuzuloj el Bass Rock». Akrokula sulo ŝvebas tridek metrojn (foje eĉ pli) alte super la marnivelo por trovi fiŝaron. Tiucele ĝi kapablas flugi plurajn centojn da kilometrojn tage. Ekvidinte sian kaptotaĵon, ĝi lasas sin sage fali rekten en la akvon, kapon malsupren. Ĝi tiel povas atingi 100km/h, kiam ĝi enpenetras la maron, plonĝante pli ol dek metrojn profunden, surprizante la fiŝojn. Ĝi voras inter 400 kaj 700 g da fiŝaĵoj ĉiutage.

Kiam la ido pezas ĉirkaŭ 4 kg, ĝi forlasas la neston kaj la kolonion. Ĝi tutsole eklernos vivteni sin. Sed tio tre malfacilas kaj 80% de sulidoj mortas en sia unua jaro. Dum sia vivo sulparo naskos pli malpli dekkvin idojn, el kiuj averaĝe nur tri iĝos plenkreskaj, kapablaj siavice naski. Tial la nombro de sulkolonioj en la mondo restas malalta. Des pli ke ili suferis katastrofajn naftoelverŝojn, homan troan fiŝkaptadon kaj laste ankaŭ birdan gripion. Tial la specio restas fragila kaj protektata de la Berna konvencio.

Inĝenierojn ofte inspiris naturo. La aerodinamikecon de sulo dezajnistoj kopiis por la aviadilo *Concorde*. Kaj pristudante la plonĝarton de sulo, la esploristoj demandis sin, kiel tiu birdo povas tiel sendolore enpenetri la akvosurfacon. Ili tiam malkovris kvazaŭ aerkusenetojn ĉe la fronto kaj la ŝultroj. De tie fontas la savaj aersakoj, kiuj ŝprucas en aŭtomobilo protekte al la veturantoj kaze de akcidento.

Konklude: Renkonte al tiu natura mirindaĵo mi varme rekomendas en junio aŭ julio la duhoran ŝipadon el Perros-Guirec ĉirkaŭ la Sep insuloj. Krom suloj, vi eble, kiel ni, ekvidos ankaŭ kormoranojn, sternojn, mevojn, larojn sed ankaŭ marpigojn (huïtrier pie), atlantikajn fraterkulojn (macareux moine)... kaj eĉ fokojn!

Marcelo (Sekve al vizito dimanĉon la 25an de junio 2023 en akompano de Klodin' kaj Vinko Markov)

Inter la esploritaj retaj fontoj:

<https://lemagdesanimaux.ouest-france.fr/dossier-916-fou-bassan.html>

<https://www.pressreader.com/austria/ecoute/20220824/282565906941273>

Sulinsulo

Rekantaĵo

Mi naskiĝis sur klifaj reliefoj
Meze de kormoranoj kaj ridmevoj!
Tamen sur ĉi rokinsulo
Al mi plej plaĉas la... sulo!

Infano, mi revis forflugi trans maroj,
Aŭtune migrante al sudo kun laroj,
Por vidi flavajn dunojn,
Admiri ravajn sunojn.

La suloj, sulinoj, sulidoj imponis.
Fervore mi ilin sekrete spionis,
Kaj ŝvebis mi ĉiele
Fajfante ritornele.

Rek.

Mi kunĝuas sur klifaj reliefoj
Meze de kormoranoj kaj ridmevoj!
Tamen sur ĉi rokinsulo
Al mi plu plaĉas la... sulo!

Milope sulparoj dum viv' kolonie
sur nesto tutsama rekovas junie
Fidele sen modifo
Ekzakte sur ĉi klifo.

Al mi instruis ĉi birdoj plonĝarton,
por sage, efike fiŝkapti pilĉardon.
Sed faste mi konfesas:
Mi ĉiam malsukcesas.

Rek.

Vi kunĝuu sur klifaj reliefoj
Meze de kormoranoj kaj ridmevoj!
Venu al ĉi rokinsulo,
Al vi ekplaĉos la... sulo!

Marcelo

en L' Hortie la 2an de aŭgusto 2023



**«Oni neniam banas sin dufoje
en la sama fluo!»**

Heraklito

Fragmentoj (6a-5a jarcento antaŭ Kristo)



Eĉ se malplaĉe al la filozofoj, kiuj ekzaltas la unuon, la eternecon, la Estaĵon kun majuskla E, nenio estas stabila, nenio estas daŭra en la mondo, en la kosmo. Eĉ la rivero, en kiu ni banas nin neniam estas la sama, ĉar ĝia fluo forportas ĉion. Vane estas esperi trovi fiksankropunkton en la realo aŭ en la ideoj. Ĉio estas movo, ŝanĝo, onto. Kaj tiel estas tre bone!



**« On ne se baigne
jamais deux fois
dans le même fleuve »**

N'en déplaise aux philosophes qui exaltent l'unité, l'éternité, l'Être avec un grand E, rien n'est stable, rien n'est permanent dans le monde et dans le cosmos. Même le fleuve dans lequel nous nous baignons n'est jamais le même, car son courant emporte tout. Il ne faut pas espérer trouver un point d'ancrage fixe, ni dans le réel, ni dans les idées. Tout est

mouvement, changement, devenir. Et c'est très bien ainsi !

<https://www.philomag.com/philosophes/heraclite>

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

